

Pri la konkurso la Verko de la Jaro
de la abonantaro de *Literatura Foiro*
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 736, 1977.11.16 & 18 & 19

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La esperantistoj fieras, ĉar Claude Piron, kiu verkas sub la pseŭdonomo Johán Valano, ricevis gravan literaturan premion. La abonantaro de *Literatura Foiro* voĉdonis por elekti la **Verkon de la Jaro 1976**. Inter ok submetitaj titoloj ses estis prozaj verkoj, nur du poeziaj. Jen la rezulto, laŭ procento de voĉdonantoj :

A.- *Ĉu vi kuiras ĉine* de Johán Valano, ĉe Dansk Esperanto Forlag : 55 %.

Cl.- *Rimleteroj* de Auld-Boulton, ĉe Esperanto-Kajeroj de Salvesen : 24 %.

A.- *Transe* de Lorjak, ĉe Fondumo Esperanto : 9 %.

Cl.- *Ĝis nun* de Dafne Lister, ĉe Esperantaj Kajeroj de Salvesen : 6%.

A.- *Vage tra la dimensioj* de Konisi, ĉe Japana Esperanto-Kooperativo : 3 %.

Cl.- *Okinavo* de Miyamoto Masao, ĉe Librejo Pirato : 3 %.

A.- Ĉu la verdikto dependas unuavice de la prestiĝo de la eldonejoj ? Perla Martinelli, en artikolo aperinta en la oktobra numero de *Literatura Foiro*, opinias ke ne estas tiel. Jen ni citas ŝin :

Cl.- « *La sola surmerkata handikapo koncernis la tamen bonegajn verkojn de la japanoj, evidente malpli konatajn en Eŭropo ; sed la du skandinavaj eldonistoj, malgraŭ sia tradicio, devis rezisti al la serioza konkurenco de Salvesen el Manĉestro, tute nova sur la merkato.* »

A.- Ĉu la publikon influis la famo de la aŭtoroj ? sin poste demandas Perla Martinelli. Kaj ŝi respondas negative. Ni ree citas ŝin :

Cl.- « *La du britaj **titanoj** (tio estas Auld kaj Boulton) cedis al debutanto, kaj la poemaro de Lister, la sola jam premiita verko inter la kandidatoj, estis sufiĉe malbone traktata de la publiko.* »

A.- Perla Martinelli konkludas, « *ke la legantaro juĝis relative sendepende eĉ de la opinio de la kritikistoj : Valano mem, sur la paĝoj de **Literatura Foiro**, ja ne ricevis la plej varman akcepton fare de Clelia Conterno, kies tono mildiĝis nur, ĉar ŝi suspektis (ĉi-foje ne funkciis la virina intuicio [...]), ke Johán Valano estas [...] Giorgio Silfer !* » la ĉefredaktoro de *Literatura Foiro* mem.

Cl.- Nia Radio povas fieri, ke pere de nia duprelega recenzo ni kontaŭe pozitive influis vastan legantaron favore al la libro de Johán Valano. Tiun ĉi recenzon poste publikigis la organo *Monata Cirkulero* de Kultura Centro Esperantista. La ĉefpremiado de la verko *Ĉu vi kuiras ĉine* ? estis proklamita en Poitiers okaze de la TEJO-kongreso kaj la koncerna kultura vespero, dum kiu la aŭtoro Claude Piron prezentis kantaton kaj la kanzonisto Olivier Tzaut

interpretis kun sia kutima talento aron da kanzonoj, kiujn la premiito esperantigis, lasos al la ĉeestintoj neforgeseblan pozitivan impreson.

A.- La revuo *Literatura Foiro* anoncas la baldaŭan aperon de du novaj verkoj de Claude Piron aŭ Johán Valano, tio estas poemkolekto titolota *Malmalice* kaj eldonota fine de ĉi tiu jaro ĉe La Nuova Frontiera, kunlabore kun la Librofako de *Literatura Foiro*, kaj la romano *Ĉu li bremsis sufiĉe ?*, nova enketo de Jano Karal. Ĉiuj atendas senpaciece la aperon de tiu ĉi dua krimromano de Johán Valano.

Cl.- Konklude al nia hodiaŭa elsendo ni citos parton de artikolo de Giorgio Silber, koncerne la venkon de *Ĉu vi kuiras ĉine ?*

A.- « La venko de *Ĉu vi kuiras ĉine ?*, la unua detektivromano de Johán Valano aŭ Claude Piron, estas interpretebla diversmaniere.

Cl.- Se laŭ **historia** vidpunkto, ĝi signifas plej brilan enkondukon de Piron, certe jam konata aktivulo, en la verdan parnason ; krome kaj eble precipe, ĉi tiu literatura laŭro ŝajnas kroni la fruktodonan agadon de manpleno da homoj en Svislando, kiuj dum dek jaroj konstruadis firman fundamenton por la nuntempa kultura centro de Esperantujo : kaj la neŭŝatela Ĵuraso, apud la impona atingo de Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia, CDELI, la efika laboro de Kultura Centro Esperantista, KCE, la faka nivelo de Internacia FERIA Altlernejo, IFA, la ekonomia sendependeco de Gastejo **Edmond Privat** (GEP), la situo de la okcidenta redaktejo de *Literatura Foiro*, LF, povas fieri pri la sukceso de Valano. Pri La Chaux-de-Fonds ne estas aŭdace prognozi, ke iam ĝi havos por Esperanto la organizan gravecon de la postmilita Roterdamo kaj la kulturan prestiĝon de la antaŭmilita Budapeŝto. »

A.- Ni vidos, ĉu la profetaĵo de la ĉefredaktoro de *Literatura Foiro* realiĝos. Almenaŭ ĝi honorigas la svisojn.

Cl.- Giorgio Silber daŭrigas : « Sed la premiita romano ne portas al ni bildojn el Svislando : la **Sanktavallo** de la milda fikcio havas la trajtojn de la Moza Valo, kaj ĝiaj loĝantoj la karakteron de Lotaringio. Piron naskiĝis ja tie, en la Namura regiono, tial li rajtas nomi sin **Valano**.

A.- Se Belgio pruntedonas la fonon, Simenon (alia belgo inspiras la teknikon : la murdisto estas neniam renkontita homo, certe ne la ĉina kuiristo. [...] »

Cl.- La elekto de la ĝenro konfirmas, ke la aŭtoro estas psikologo : la insisto pri kelkaj lingvaj aspektoj montras, ke li estas profesia interpretisto, kiu per sia poligloteco atingis tre altan lingvan sentemon. Kaj per tiu (aŭ pro tiu ?) sentemo Valano reagis al la **okcidenta dialekto**, kiel li difinas la lingvon de la plej degenerintaj imitantoj de la kvaropismo, aŭ de la plej pedantaj PIV-emuloj. Tial lia lingvaĵo, ankaŭ poezie, fariĝas nekredeble simpla, kvazaŭ intenca neglekto (kio ne signifas mankon de kono) pri la spertoj de du jardekoj da poezia produktado. [...] » (Fino de la citado.)

A.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !